

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1 januaro 1906

Statistiko pri la jaro 1905-a	1
Boris Kotzin : Sur la kampo de la morto	6
Fanny Reybaud : La Templano (esperantigis C. DE REY-PAILHADE)	8
Ronsard : La Rozo, <i>poemo</i> (esperantigis A. COMTE)	12
Miksajoj Kio estos en la jaro 1906-a. — La atenco kontraŭ la Hispana Reĝo. — Sokrato. — Poŝtkartoj ilustritaj. — Bagateloj	13
E. Ĉefeĉ : Kiu estas la eltrovinto de la telefono ?	15
Th. Ĉejka : X-a internacia Kongreso kontraŭ alkoholismo	17
P. Champion : Terkultura Kalendaro (Januaro)	19

Tra la mondo Esperantista

Movado Esperantista	21
Gazetaro Esperantista	26
Diversaĵoj	31

Nia aldono literatura (1—16 paĝoj) : **La benkoj de la promenejo**, monologo de COQUELIN JUNA (tradukis P. CORRET). — **La luphomo**, kanada rakonto de L. FRECHETTE (tradukis A. P. BEAUCHEMIN), *komenco*.

Statistiko pri la jaro 1905-a

Oni povas diri, ke la ĵus mortinta jaro havos grandan lokon en la historio de Esperanto.

En **Anglujo** fondiĝas nun preskaŭ ĉiusemajne nova grupo esperantista ; 36 ekzistas en Granda Britujo. Multaj revuoj kaj gazetoj enpresas regule sciigojn pri Esperanto ; inter ili aparte citindaj estas la *Review of Reviews*, nia potenca subtenanto, kaj *The Daily News*, ĉiutaga Londona gazeto, kiu enpresas regule informojn en Esperanto. — La anglaj lernejoj komencas malfermiĝi por nia lingvo, kiel en Keighley kaj en Aberdeen. — La anglaj komercistoj ankaŭ komencas surprisigi sur sian leterpaperon : « Oni korespondas en Esperanto ». La granda argumento de niaj kontraŭuloj, ke neniam Angloj lernos Esperanton, disfalas. — Tre dankemaj ni povas esti al la *British Esperanto Association*, kiu grandaparte kaŭzis tiun progresadon per la fervora laborado de siaj membroj kaj per la unuanima subtenado de

paganda, kiu al militis la Universitaton : D-ro Nalli redaktas esperantan fakon en la Sicilia Universitaria. En Romo fondiĝis grupo. En Naplo ekreeldoniĝis la malaperinta *Itala Esperantisto*, sub nomo *Gefratario Esperanta*, — **Svisujo** pretiĝas por inde gastigi la proksiman Kongreson de Esperantistoj, kaj grupoj komencas fondiĝi diversloke. — En **Aŭstrujo**, aparte en **Bohemujo**, niaj samideanoj ĉiam ageme propagandas per paroladoj, ekspozicioj kaj gazetoj. — En **Hungarujo** fondiĝis Esperantista Societo kaj kreiĝis Esperanto-magyara gazeto.

*

En **Ameriko** komencis rapide disvastiĝi nia lingvo. En **Suda Ameriko**, precipe en **Peruo**, dank' al la fervora agado de P-ro Villareal kaj de lia gazeto *Antaŭen Esperantistoj*, iom post iom al militiĝas la tuta klerularo. — En **Ĉilio**, en **Centra Ameriko**, vidiĝas ankaŭ la influo de nia Perua samideano. — En **Norda Ameriko**, ni precipe povas rimarki energian movadon en **Meksikujo**, kie dank' al laborado de S-ro Morin kaj de S-ro Vargas, fondiĝis *Meksika Societo p. p. E.* kaj firmiĝis la gazeto, *Meksika Lumturo*. — En **La Unuiĝo**, nia lingvo ekfariĝis siajn unuajn seriozajn paŝojn : fondiĝis grupoj en tri urboj dank' al laborado de fervoraj samideanoj, kiel S-roj Twombly, Talmey, Morin, k. a. Fine la alveno de P-ro Ostwald, el Leipzig, jam forte puŝis antaŭen nian lingvon kaj esperigas la plej ŝatindajn rezultatojn. — En **Kanado**, la propagando ankaŭ ne haltiĝis, kvankam ĝi iom senbruiĝis kaj malrapidiĝis, pro la malapero de la *Lumo*.

*

En **Azio**, la cirkonstancoj estis tute malfavoraj. Tamen ni povas enregistri kelkan progresadon en **Japanujo**, en **Hindujo** kaj eĉ en **Hinujo**.

*

En **Aŭstralio**, **Nova Zelando**, kaj alieaj tieaj landoj, ankaŭ komencis disfloriĝi nia lingvo. Fondiĝis grupoj en Melbourne, en Christchurch, kie la gazetaro bone subtenas nin, dank' al klopodoj de S-roj Booth, Field, k. a.

*

En **Afriko**, fine, ni vidis, ke la agado fervore komencita de Kapitano Capé, en Alger, bone daŭriĝis, dank' al S-roj Aubert, Baissac, k. a. **Algerio** nun estas tute fervora, kiel Erancujo, kaj **Tunizio** komencas imiti ĝin. — En **Gvineo** fondiĝis grupo Esperantista, dank' al S-roj Blondel kaj Desmarets. — En **Suda Afriko**, **Transvaalo**, **Oranĝo**,

k. a. disvastiĝis nia lingvo ankaŭ ŝatinde, precipe inter la loĝantoj anglaj kaj germanaj.

*

Por fini tiun necese sekan kaj unutonon statistikon, ni devas rememorigi niajn legantojn pri la speciale internaciaj progresoj faritaj dum la lasta jaro. Fondiĝis diversaj fakaj societoj internaciaj de Esperantistoj. S-ro G. Moch fondis « *Pacifisto* » kaj ĝian organon » *Espero Pacifista* », por tiuj, kiuj okupas sin pri la paca movado. — S-ro Hakansson en Södertelge, S-roj Aubert en Alger, D-ro Hanauer en Frankfurt, kaj aliaj samideanoj formis aron da grupoj de *socialistaj esperantistoj*, kiuj havas inter si tre oftajn rilatojn. — Fondiĝis *framasona internacia Societo esperantista*, kies estraro entenas du Francojn, unu Anglon kaj unu Germanon. — D-ro Rodet, en Paris, D-ro Whitaker, en Shrewsbury, fondis *medicinistajn grupojn*, kaj nun la diverslanda kuracistaro havas sian specialan organon, *Internacia Revuo Medicina*. — P-ro Cart pli kaj pli firmigis la *interblindulan propagandon*, komencitan antaŭ kelkaj jaroj de S-roj Thilander kaj Ahlberg, en Svedujo. Dank' al la sindonema agado de F-ino Zabilon d'Her, en Lyon, kiu organizis kaj sukcesigis internacian loterion, l'estonto de tiu entrepreno kaj de la *Ligilo*, esperanta gazeto presata je punktoj Braille, estas nun por longe certigita. — En Parizo definitive fondiĝis la *Presa Esperantista Societo*, kiu, akcie starigita de diverslandaj Esperantistoj, celas disvastigi Esperanton per ĉiuj presaj kaj eldonaj rimedoj. La plioftigo de la *Lingvo Internacia*, la eldono de gravaj verkoj, kiel la *Vortarego Franca-Esperanta*, la entrepreno de serio da tute konfidindaj eldonaĵoj, estas la unuaj plej konataj sekvoj de tiu ĉi fondo. Aliparte, nun ekzistas en Parizo centro esperantista, kie laboras diversnaciaj Esperantistoj, kaj kie oni povas ricevi ĉiujn esperantajn eldonaĵojn, aboni ĉiujn gazetojn, ricevi informojn, k. t. p. Fine, la dirita societo fabrikigis esperantajn literarojn, matricojn por Linotipoj, k. t. p., kaj tiamaniere tre faciligis la presigadon de nia lingvo. La favorado de la tutmondaj samideanoj ebligis rapidan kreskon de la juna Societo, kiu devis jam dufoje pligrandigi sian lokon.

Fine, la gravega kaj mirinda okazo, la *Kongreso en Boulogne-sur-Mer*, lerte kaj bonege organizata de S-ro Michaux kaj liaj helpantoj en la Boulogne'a Grupo, estas ankoraŭ nun tro freŝa en ĉies memoro, por ke ni bezonu longe paroli pri ĝi tie ĉi. La plej atentindaj sekvoj estas la elekto de *Lingva Internacia Komitato* kaj la fondiĝo de *Centra Oficejo Esperantista* per S-roj Generalo Sebert, D-ro Javal, D-ro Mybs, Kolonelo Pollen, Rektoro Boirac, kun celo servadi al Esperantistoj diversmaniere. Krom tio la vojaĝoj kaŭzita en la tuta Eŭropo, de tiu granda festo, la

LA TEMPLANO

De FANNY REYBAUD

En tiu tempo, KARLO LAMA estis grafa Moŝto de Provencujo ; de bona kaj religia princo li havis la famon kaj sian devenon li ne kontraŭdiris. Li estis la vera filo de tiu KARLO D'ANJOU, kiu al militis Naplon kaj al sia graflando aldonis reĝan kronon.

Subteninte longajn militadojn por resti kvieta posedanto de la reĝlando de Sicilio, Karlo Lama revenis Provencujon por revidi sian bonan urbon Aix *) kaj por edzinigi sian lastan filinon.

En tiu epoko, la grafa palaco estis konstruaĵo de gotika arkitekturo apogita kontraŭ belega maŭzoleo, kiu servis kiel tombo por iu romana nobelo mortinta malproksime de sia patrujo en la kolonio fondita de CAIUS SEXTIUS.

La tuta lukso de tiu tempo plibeligis la palacon de l'grafrĝo de Provencujo, kaj la kleraj kaj bonmanieraj tradicioj de la kortego de BERENGER estis pasintaj en la luksan loĝejon de lia nepo.

Karlo Lama amis la literaturon, protektis la poetojn. Lia lasta filino, Beatrico, tiel bone kiel kiu ajn poeto verkis versaĵojn ; en Provencujo ŝi estis edukita, kaj varmega nacia sento allogis ŝin al tia bela floreto de la krono de ŝia patro ; ŝi gloris sin, ke ŝi estas provencino kaj la aliajn idojn de Karlo ŝi nomis « la Italoj », ĉar la belan Naplon ili pli amis ol la bonan urbon Aix.

La lundon de la sankta semajno de tiu jaro 1037-a, la reĝo Karlo, en sia dormoĉambro, atendis la horon de la vespera Diservo.

En manuskripto riĉe pentrita, la bona princo legis la tagan legendon, sed lia atento ne estis tiel plena, ke de tempo en tempo li ne turnis al junulino staranta apud la kamento malkvietan kaj kaŝatan rigardon.

Ŝi estis tie senmova, kiel sur la supro de la korniko la skulptitaj figuroj ; simpla lanrobo blanka falis per ĉarmaj faldoj ĝis ŝiaj infanaj piedoj, kaj zonumo brodita je liliaj floroj ĉirkaŭpremis ŝian altan kaj flekseblan korpon.

Dividitaj sur la frunto, ŝiaj longaj nigraj haroj flugetis libere sur ŝiaj ŝultroj, kaj en la feloj de ŝiaj trenantaj manikoj, estis kaŝataj ŝiaj graciaj kaj etaj manoj ; de malpacienca kaj muta incito ŝi ŝajnis movata kvazaŭ ŝi atendus kelkajn vortojn, kiujn la respekto malebligas ŝin peti.

— Vi staras Beatrico, — diris fine la reĝo, ne levante la okulojn kaj turnante paĝon de manuskripto, kiun per granda atento li ŝajnis legi.

*) Antikva ĉefurbo de Provencujo, en suda provinco de Francujo.

— Landsinjoro, — respondis ŝi humile, en la sintenado, kiu konvenas por petegantino, — mi atendas, kaj ĝis kiam vi estos dirinta favoran parolon, mi ne movos min.

— Jen stranga obstineco ! — respondis la reĝo ; — ĉar vi ne volas fariĝi monaĥino, filino mia, mi decidis, ke vi edziniĝos dum la nuna jaro.

— En ĉiu alia okazo, landsinjoro, mi respondos : estu via volo ; sed ĉar al markizo de Ferraro vi promesis min...

— Nu ! Ĉu je vi kaj mia parenceco li ne estas inda ? Kiajn motivojn vi havas por rifuzi lin ? Ĉu li ne estas juna, bela, brava ? Ĉu li ne estas sufiĉe fama kaj potenca Sinjoro ?

— Li estas Italo, — respondis decide Beatrico, — kaj mi nur kun provenco edziniĝos. Se miaj fratinoj en Hispanlando kaj en Francujo edziniĝis volonte, estas bone ili naskiĝis en Italujo ; sed mi kiu estas provencino, mi ne malkonfesos mian landon, edziniĝante kun fremdulo. Landsinjoro, al unu el viaj provencaj baronoj donu mian manon, kaj vin mi ĝoje obeos ; sed ne edzinigu min kun unu el tiuj italaj princoj, kiu por ĉiam min kondukos malproksimen de la lando, kie mi naskiĝis kaj kie mi volas morti.

— Miaj provencaj baronoj ? — interrompis la reĝo, — kaj kiu povus fariĝi mia bofilo ? Ili ĉiuj estas malriĉaj.

— Jes, dum tiuj ruinigaj militadoj de Italujo, ĉiuj malriĉiĝis, escepte tiuj, kiuj en la almita lando vivis, sur siaj novaj bienoj.

— Nu ! tiun fieran nobelaron, tiun honorindan malriĉecon mi multe pli ŝatas, ol la trezorojn kaj honorojn de l'markizo de Ferraro.

Nenion respondis la reĝo, kaj kun medita vizaĝo stariĝinte, li promenis en la ĉambro, trenante sian laman kruron.

— Kun kiu do vi deziras, ke mi edzinigos vin ? — diris li fine. — Ĉu mi elektu bofilon en la familio DE SAULT ? aŭ en tiu DES BAUX ? Sed jam ekzistas baronino de Sault kaj princino des Baux.

— Sinjoro, atendi mi povas, — respondis vivece Beatrico.

La maljuna reĝo skuis la kapon kaj daŭrigis sian promenadon.

Tiam la princino subite sin ĵetis al liaj piedoj kaj ilin ĉirkaŭprenante « Sinjoro, diris ŝi plorante, kun la markizo de Ferraro, ne devigu min edziniĝi ; iom da tempo lasu min ankoraŭ libera kaj sendependa ! »

Kortuŝite, la reĝo tiris siajn manojn al ŝi kaj, nenion dirante, relevis ŝin.

Tiam, — inter la larĝaj tapetoj kaŝantaj la pordon, — aperis homa vizaĝo, kaj tiu, kiu en la ĉambro de la reĝo eniris tiel libere, ĵetis maltrankvilan rigardon antaŭen.

— Aŭzono, — diris Karlo Lama, — mia filino ne volas ankoraŭ edziniĝi ; vian parolon mi redonas al vi kaj mi reprenas la mian. Tamen vi ĉiam estos unu el miaj certaj kaj fidelaj amikoj

kaj se kun familiano de la Francaj reĝoj vi volus edziĝi, de mia bona kuzo la reĝo Filipo mi petus sinjorinon.

Nur per muta saluto respondis la markizo de Ferraro, lia brula rigardo kun surda kolero falis sur Beatricon kaj kva-zaŭ por eliri li paŝis malantaŭen.

— Nun lasu nin, Beatrico, diris Karlo, sur la frunton kisan-ante sian filinon ; hodiaŭ vespere ni intervidiĝos denove.

* * *

Post kelkaj horoj, kiam eknoktiĝis, en la preĝejo de la *Templanoj* princino Beatrico preĝis.

Tien ŝi venis regule de kelkaj monatoj ; specialan ŝaton ŝi havis al la malnova kapelo, kie estis alpendigitaj tiom da armaĵoj kaj nobelaj standardoj. La potenca ordeno de la *Templanoj* posedis nur malriĉan monaĥejon en la urbo Aix ; ĝi estis antikva konstruaĵo preskaŭ kontraŭa je la muroj de la grafa palaco.

Ne estis tre vizitata la malhela kaj malmulte ornamita preĝejo, kaj tiun vesperon la princino sola, kun du virinoj el ŝia sekvistaro, preĝis en ĝi, dum, sidante sub la pluvŝirmilo de la pordego, la ĉevalestro atendas ŝin.

Beatrico estis genufleksinta sur la ŝtupoj de l'ĥorejo ; antaŭ la ĉefa altaro la penda lampo ĵetis sur ŝin palajn kaj moviĝantajn rebrilojn, kaj malproksime en la ombro aperis apogseĝoj kun altaj kaj blazonaj dorsapogiloj.

La profunda silento de l'sanktejo estis interrompata nur de la bruado de l'vento, kiu momente eniĝis sub la multsonajn arkaĵojn kaj skuis la polvon de la malnovaj standardoj pendigitaj ĉe la kolonoj. La sekvistinoj de la princino estis malsupre de la preĝejo kaj zorgis pri la pordego.

Meze de tiu silento kaj de tiuj malhelaj lumoj du koroj batis kaj respondis sin reciproke ; trans la mallumo de la sanktejo la okuloj de Beatrico estis renkontintaj iun ; ŝi estis rekoninta necertan formon, aperantan en la ombro blanka kaj senmova, kiel la ŝtonstatuoj de la komandoroj de l'ordeno starantaj sur siaj tomboj.

La princino ankoraŭ ne finis sian preĝon, kiam tiu mistera vizaĝo salutis kaj malrapide ĉirkaŭiris la ĉefaltaron, kie ĝi fleksis genuon.

Tiam, ĉe la dublumo de la lampo, ŝi rekonis la blankan kielon kaj la ruĝan krucon de novulo de l'ordeno.

— AIMAR DES BAUX ! murmuris Beatrico per rapida kaj timema voĉo.

La juna Templano iris ĝis la ŝtupoj de l'apsido kaj post la principinon genufleksis. Tiam ne rigardante lin, ne turnante ŝin al li, rapide kaj per kortuŝita voĉo, ŝi diris : « Bonan esperon, mia nobla kavaliro ; mi ĵetis min al la piedoj de mia patro, kaj li deprenis la parolon, kiun li estis doninta al la markizo de Ferraro.

La Templano ekkaptis la finaĵon de la longa vualo flugetanta ĝis la piedoj de la princino kaj premis ĝin kontraŭ siaj li-
poj.

— Mi tiel multe preĝis Dion pri tio, — diris ŝi, — Aimar, al mia reĝa Moŝto, mia patro, mi diris ankaŭ, ke mi obeus plezure al li, se li donus al mi kiel edzon unu el siaj provencaj baronoj, kaj tiam, kiel la plej inda je lia boparenciĝo, li citis vian nomon ; sed la templanan kostumon vi — portas...

— Nenian religian promeson mi faris, kaj al la ordeno mi apartenas nur laŭ simplaj promesoj, respondis li per voĉo mallaŭta kaj kortuŝita de espero kaj ĝojo ; — la tuta mia vivo, Beatrico, dependas nur de unu via vorto !

Tiam ŝi malrapide turnis sin al li kaj respondis :

— Morgaŭ, barono des Baux, vi demetos tiun veston, kaj postulos la parton de heredaĵo, kiun vi volis forlasi ; poste en la kortegon de la reĝo, mia patro, vi revenos. Tiam, tiu Italo ne estos plu tie.

— Mi ne timas lin, Beatrico, — interrompis rapidege la Templano ; — mia glavo estas tiel bona, kiel lia.

— Jes, via glavo ; sed la ponardo, kiun li portas ĉe sia zono ? La Provencoj estas nekaŝemaj kaj senartifikaj ; sed trans Alpoj la homoj estas ruzaj kaj perfidaj ; ili frapas malantaŭe... Mi ne scias, sed io avertas min, ke AUZON DE FERRARO estas perfidulo kaj malkuŝaĝulo.

Malforta bruo, mallaŭta ekkrio post la princino ŝajnis aŭdiĝi ; ŝi silentis subite kaj, starigante, turnis la kapon maltrankvile.

— Nenio estas, diris Aimar, nur la vento bruas ; ĉe la pordego zorgas viaj sekvistinoj kaj mi fermis la pordon de la monaĥejo. Ho ! restu, restu ankoraŭ Beatrico !

Li estis ĉe ŝiaj piedoj kaj ŝi rigardis lin penseme.

— Nu ! ŝi diris kviete, ĉu mi elfaris ĉion, kion iam mi promesis malantaŭ la kradoj de l'monaĥejo ? Sian vualon formetis la novulino ; la fianĉino redonis la ringon, kiun oni volis meti sur ŝian fingron. Tion mi estis promesinta al Dio kaj al vi. Beatrico de Provencujo nur sian nomon ŝanĝos por la nomo « Sinjorino des Baux ». Ĉu vi ne kredas tion nun, Aimar ?

Li kisis la manon, kiun ŝi tiris al li kaj vigle respondis :

— Ĉu mi estus viva sen tiu espero ! Kiam mi surmetis tiun ĉi kitelon kaj forlasis la mondon por min enŝlosi en tiun rifuĝejon, vi estis tiam en la monaĥejo de Nia Sinjorino Nazareta en la unua tago mi vidis aperaĵon : dum mi faris la noktan Diservon ĉe tiu sama loko, al mi ŝajnis, ke la preĝejo luminiĝis subite ; apud l'altaro mi ekvidis vin, sen vualo, kun flugetantaj haroj ; la religian robon vi jam ne portis kaj, antaŭ la sankta evangelio genufleksinte, vi atendis min... Kiel odora fumo, kiel lasta radio suna malaperis la vidaĵo : templanan robon mi portadis, sed mi decidis, ke mi ne elparolos religian promeson... Hodiaŭ, Beatrico, mi estas — ankoraŭ libera !...

— Jes, ambaŭ liberaj ! — diris ŝi kun profunda ĝojo ; al Nia Sinjorino Angela, mi promesis ke, la morgaŭan tagon de nia edziĝo, mi demetos sur ŝian altaron mian virgan kronon ; Ŝi nin protektis... Adiaŭ, nun adiaŭ, jen la nokto, adiaŭ, Aimar !

Ili disiris, kaj dum Beatrico foriris tra la preĝeja pordego, la Templano eniris en la monaĥejon, ĉar la sonorilo ĵus vokis la religiulojn al la manĝejo.

(Daŭrigota)

Tradukis S-ro C. DE REY-PAILHADE.

LA ROZO

Amikino ĉarma, ni iru por vidi
 Ĉu la rozo, kiu matene disvolvis
 Sub la suno sian purpuran kroneton,
 Eble perdis jam nun, vespere, la faldojn
 De l' purpura robo, kaj sian koloron
 Al la via similan.

Ve, ho vidu kiel, mallonga post tempo,
 Amikino mia, ĝin baldaŭ forlasis,
 Disfalintaj teren, la ĝiaj belaĵoj !
 Ja, Naturo estas malbona patrino,
 Se eĉ floro tia nur daŭras mallonge
 De l' mateno ĝis nokto !

Amikino kara, do kreu konsilon :
 Dum la aĝo via ĉarmege floradas
 En la sia verda, plej freŝa, noveco,
 Vi ĝuadu, de nun, la vian junecon :
 Kiel tiun floron, la Tempo velkigos
 Ankaŭ vian junecon !

Ronsard

Esperantigis : A. COMTE, Boulogne.

MIKSAĴOJ

Kio estos en la jaro 1906-a. — Sinjorino de Thèbes antaŭdiras

1906 ne estos jaro *griza*, kiel 1904 ; nek *ruĝa* jaro, kiel 1905 ; ĝi estos *freneza* jaro, jaro de universala ĝeno, kunportanta serion da okazaĵoj ne antaŭviditaj, kaj da kontraŭaĵoj, konfuzantaj la fonditajn instituciojn.

En Francujo, dolorigaj « financaj » malfeliĉoj ; en la Nordo de Eŭropo, elrenversoj ; en Germanujo, renversegoj ; la germana imperio estas speciale minacata. « La tagoj de pli ol unu princo estas tie kalkulitaj. » — Pri la malgranda Belgujo, ĝi ludos rolon « strangan kaj gravan » kaj rimarkindaj ŝanĝoj estas tie tuj okazontaj, kiuj havos la plej timindan influon pri la reciproka situacio de la eŭropaj nacioj.

« Militon ĉu ni havos ? — ekkrias la divenistino. — Tion ĉio antaŭdiras en la agado de l'homoj ; nenio certigas ĝin neevitebla en la libro de la fatalo... Sed tio ne signifas ke Eŭropo restos paca... La antaŭsignoj estas maltrankviligaj. »

Tamen Francujo sentos pli multe da bono ol malbono, post malfacilaj provoj moralaj kaj politikaj. — P. CH.

La atenco kontraŭ la Hispana Reĝo, pri kiu oni tiom parolis dum lasta tempo, estis de longe antaŭdirita.

Oni povas konvinki sin pri tio, legante la anglan almanakon, titolitan *Old Moore's Almanack, for the year 1905, with numerous beautiful engravings... and predictions of coming events*, kaj eldonitan en Londono, la jaron 1904, dum la monato decembro.

Inter la antaŭdiroj de la fariĝoj de la jaro, oni povas legi kelkajn liniojn kies traduko estas la jena, kiun ni donas tre akurate :

« Ni estas certaj ekscii novaĵojn el Hispanujo, sciigante anarkian atencon kontraŭ la vivo de la juna reĝo Alfonzo. Tiu juna monarko ĉiutage fariĝas pli kaj pli populara, kaj OLD MOORE estas feliĉa pensante ke la fanatikuloj estos trompigataj en siaj espero. »

La antaŭsciigo rilatis al la monato junio, la atenco okazis la 31-an de majo. — P. CH.

Sokrato. — Viro preterkuris Sokraton dum unu el promenadoj de la filozofo. Alia viro kiu postkuris lin, kriante « arestu, arestu ! », haltis ĉe Sokrato kaj riproĉis : « Kial vi ne malhelpis lian forkuradon ? Li estas krimulo, mortigisto ! »

— Mortigisto ! Kion vi komprenas per tiu ĉi vorto ?

— Ne ŝercu : mortigisto estas homo, kiu mortigas.

— Buĉisto ?

— Malspritulo ! Homo, kiu mortigas alian homon.
 — Ha, jes ! Soldato.
 — Azeno ! Homo, kiu mortigas alian homon ekster mi-
 lito.

— Mi komprenas ekzekutisto.
 — Idiotulo ! Homo, kiu mortigas alian homon hejme.
 — Tre bone : kuracisto.

La postkurinto foriris, senkuraĝigita, konvinkita, ke lia kunparolinto estas maljuna frenezulo.

M.

Poŝtkartoj ilustritaj, kun korespondaĵo apud la adreso, estas uzablaj nun inter Anglujo kaj Francujo, se la adresflanko havas fakon prese pretigitan por tio.



FAMA KURACISTO, tuj mortonta, kaj ĉirkaŭata de multaj kunfratoj, diris al ili :

« Sinjoroj, mi lasas post mi tri lertajn kuracistojn. »

Petite, ke li nomu tiujn tri famajn praktikistojn, li aldonis Ili estas akvo, ekzercado kaj dieto.

DOMAĜE KAJ DOMAĜE. — *Fraŭlino* : Kial vi ne edziĝas, barono ? Eĉ estas domaĝe, tia viro, kiel vi !

Barono : Sed, mi ja estas edziĝinta.

Fraŭlino Kiel, ĉu vi estas edziĝinta ? Ha, kiel domaĝe !

TRE NEKOMPREENEBLE. — Patrineto, kie vi naskiĝis ?

— En Kievo.

— Kaj la patreto ?

— En Peterburgo.

— Kaj mi ?

— Vi, mia kara, en Moskvo.

— Strange, kiamaniere ni ĉiuj triope renkontiĝis kaj konatiĝis.

LERTEGA MENSOGULO. — Klarigu mi petas ! Hieraŭ vi mem diris, ke via onklo rompis al si piedon, kaj ĵus mi renkontis lin tute sanan kaj gajan.

— Ha, Dio mia ! La malfeliĉa onklo ! Prezentu, li mem ankoraŭ ne scias pri sia malfeliĉo.

MALGRANDA DIPLOMATO. — Patrineto, kio estas pli malbona en la okazo, se mi falus de arbo : ĉu se mi rompus la manon, aŭ se mi nur disŝirus la veston ?

— Komprenoble, estus multege pli malbone, se ci rompus la manon.

En tia okazo, ĝoju patrineto : mi nur disŝiris la veston.

Kiu estas la eltrovinto de la telefono ?

Elpensinto de la elektra telefono estas kredata la instruisto PHILIPP REIS el Friedrichsdorf, kiu en 1861 konstruis aparaton malproksimen parolantan, kiun oni jam hodiaŭ konservas en la imperiestra poŝtmuzeo en Berlino.

La unua praktike uzebla telefonilo estas farita de la amerikano BELL en la jaro 1875.

Skribas leganto :

Nek REIS nek BELL estas la eltrovinto de la telefono, kiun jam en la jaro 1854 tre detale priskribas kaj kredeble ankaŭ konstruis la franca matematikisto CHARLES BOURSEUL.

Pri tiu ĉi homo kaj lia eltrovo la frankfurta *Didaskalia*, (n-ro 232, 18-a de septembro 1854) sub la surskribo « Elektra Telefonado » ja raportis tiele :

« La mirindaĵoj, per kiuj ne nelonge elektreco nin surprizis, ŝajne pliigos per io nova, kiu ne nur preparos el la ĝisnua elektra telegrafado grandan revolucion, sed kiu nekalkuleble pliigos ĝian utilon.

« Tio ĉi estas nenio pli aŭ malpli ol la elektra transsendado kaj translivero de la parolata vorto.

« La ideo venas de juna, modesta kaj instruita homo, CHARLES BOURSEUL, kiu en 1848 estis soldato en la afrika armeo, kie li altiris la atenton de la vicreganto (nun loĝanta en Parizo) per matematika kurso, kiun li donis en Algerio al la kameradoj de la garnizono.

« Eble la problemo de BOURSEUL, (kies efektivegeblecon li tute ne dubas,) alviciĝas al tiuj elpensadoj, pri kiuj poste klerularo diras, ke ili estas tre simplaj, kaj pri kiuj ĝi tiom deziras nin kredigi, ke ili estus jam longe faritaj, se nur oni estus volinta priklopodi.

« Oni scias, ke la principo sur kiu sin apogas la elektrotelegrafado, estas tiela : elektra fluo, kiu trairadas metalfadon, ŝanĝas pecon de forgebla fero, kiun ĝi tuŝas, en magneton.

« Samtempe kiam la elektra fluado finiĝas, ankaŭ ĉesas la magneta povo.

« Tiu ĉi magneto — la elektromagneto — povas tial alterne altiri aŭ forpeli moviĝeblan ladaĵon, kiu, per ĝia vena kaj ira moviĝo, produktas signojn, kiujn oni uzas por la telegrafado.

« Aliparte oni scias, ke ĉiuj sonoj estas transsendataj al la orelo nur per la aeraj ondoj kaj ke tial ili mem ne estas alio ol tiuj ĉi aeraj ondoj kaj ke la grandega diferenco inter la sonoj simple dependas nur de la rapideco kaj la fortenco de tiuj ĉi sonondoj.

« Ni supozu, ke lada plataĵo (disko) estus eltrovebla tiel moviĝebla kaj fleksebla, ke ĝi reproduktus ĉiujn eblajn ondojn de la aero (sonojn).

« Supozu ni plue, ke tiu disko povus esti kunigita kun elektra fluo tiamaniere, ke ĝi alterne produktus kaj interrompus la elektran fluon.

« Tiam estus ankaŭ ebla devigi elektre duan, simile konstruitan ladplataĵon, ke ĝi reproduktu samtempe kaj akurate ondojn samajn je la ondoj de la unua disko.

« La oreloj ricevus do tute egalan impreson, ĉu oni parolus tute apud la dua disko, ĉu oni parolus ĉe la unua.

« La elektra telegrafado, kiu siatempe estas signita kiel sensencaĵo, nun trairas la tutmondon kiel aperaĵo preskaŭ tute kutima.

« Se ni ekzamenos kaj esploros la principojn de la fiziko koncerne la novan ideon de juna fizikisto, ni vidos ke ili ne sole ne kontraŭstaras al ĝia ebleco, sed ke ĝia sukceso eĉ ŝajnas esti pli kredebla ol antaŭ ne longe estis la elektra telegrafado mem.

« Se ĝia efektivigo prosperus, la elektra telegrafado fariĝus komuna propraĵo.

« Nenia instruo estus necesa kaj neniaj maŝinoj pli ol 1 galvana kolono (pilo), 2 ŝanceblaj ferdiskoj kaj 1 metal-fadeno.

« Sen alia preparaĵo, se unu persono parolus ĉe la unua disko kaj alia tenadus la orelon ĉe la dua, ambaŭ povus interparoladi kvazaŭ ili estus kune.

« La juna eltrovinto kredas la efektivigeblecon de lia ideo kaj ekpetas la sciencistojn pruvi, ke la leĝoj de la fiziko kontraŭdiras la suprediritajn principojn kaj ke pro tio la efektivigo estas nebla.

« Intertempe, ŝajnas al mi, la afero meritis grandmezure la atenton, kiun oni sendube al ĝi alportos.»

Post tiuj ĉi ne kontraŭdireblaj vortoj, kiuj detale priskribas la tutan eltrovon — kie restas nun REIS kaj BELL ?

REIS, kiu sendube konis kaj ankaŭ kredeble legis la tiam multege legatan *Didaskalion*, uzis laŭ mia opinio tiun ĉi artikolon de septembro 1854 kaj apogante sin sur la konstataĵoj de BOURSEUL, li konstruis la telefonon.

Mi vane penadis atingi pli da detaloj pri BOURSEUL. Se la francaj sciencistoj sin interesus pri tiu ĉi certe ne malgrava afero, oni povus sendube trovi kaj alporti pli da materialo pri li (*Westfälisches Volksblatt*, n-ro 223, 1905.)

X^a internacia Kongreso kontraŭ alkoholismo

Tiu kongreso okazis en monato septembro 1905 en *Budapest*; kaj estis malfermita dum ĉeesto de multaj delegitoj el ĉiuj civilizitaj landoj. Eĉ Rusujo kaj Japanujo partoprenis. Post oficialaj salutoj paroladis P-ro Max GRUBER el Munheno « Pri higieno de propra mio ». Li rezultas ke moralaj predikoj en si mem estas sensignifaj. Edukado estas bezona. Neniu urbo evolucas mem, sed ĝi devas esti edukata. Trouzado de alkoholo malhelpas modernan edukadon. Post debato posttagmeza parolis P-ro LAITINEN el Helsingforso kaj P-ro WEIGANDT el Virsburgo. Lasta parolinto konstatas, ke alkoholo malutilas al funkciado de homa organismo kaj precipe de cerbo. Funkciadon de cerbo malfaciligas eĉ de malgranda parto da alkoholo.

Duan tagon paroladis P-ro KASSOWITZ pri temo « Alkoholo kiel nutraĵo ». Kiu opinias, ke alkoholo varmigas, fortigas kaj refreŝigas kaj anstataŭas aliajn nutraĵojn, tiu agas kiel maŝinisto, kiu volas enŝpari duonon da karbo kaj fine konvinkigas, ke laborkapableco de maŝino estas nur duona. P-ro Aŭg. FOREL parolis pri « Alkoholo kaj vivo sekse ». Alkoholo estas plej granda mortiganto de homaro; ĝi venenas jam en komenco la ĝermantan embrion. De gepatroj-alkoholuloj degenero estas transportata al infanoj. Homaro ellernu abstinencon pli frue ol estos malfrue. Posttagmeze estis parolado de P-ro E. BLEULER, el Zuriĥo pri « Alkoholo kaj leĝo puna ». Plej granda parto da krimoj estas farata de alkoholuloj aŭ en ebrieco. Kriminalo homojn ne plibonigos. Tiuj, kiujn ebrieco kondukis al krimo, devus esti punataj per deviga abstinenco. Anstataŭ konduki ilin en kriminalon oni donu ilin en sanigejon. Pastoro Gustavo MÜLLER plendis pri pereiga influo de komercado per alkoholo. Afrikaj enlanduloj estas preskaŭ mortigataj per eksporto de alkoholo el Eŭropo.

— D-ro MERNOTIĈ, ĉefa kuracisto de stabo, proklamis en nomo de militista ministraĵo, ke ministraĵo rigardas laborojn de kongreso kun intereso kaj ke ĝi scios taksi ĝiajn rezultatojn. Sveda delegito VILAUEDEC raportis pri eksperimentoj kontraŭ-alkoholaj en militistaro sveda. Soldatoj pafadis, antaŭ ol ili trinkis alkoholaĵojn kaj post trinkado; certeco de pafado estis en dua okazo (post trinkado) malgrandigita. Taso da konjako post 10 minutoj efikas je nervoj, tiel ke soldato perdas certecon en celado. Samtempe oni rimarkis, ke soldatoj-drinkuloj dum longaj marŝoj suferas plej multe de sunfrapo. — Fervoja kuracisto D-ro BEKES raportis pri similaj rezultatoj en servo ĉe fervojo. Li postulis abstinencon de fervoja servistaro kaj instruadon pri alkoholo al oficistoj.

Direktoro de fervojoj TERRA sciigis, ke Budapest'aj administrantaroj de fervojoj jam *morgaŭ* komencos reformojn en tiu

ĉi direkto. — Federacio de germanaj virinaj societoj postulis, ke oni ne akceptu kiel donacoj por soldatoj en Afriko la alkoholaĵojn. — P-ro VANDERVELDE, konata kondukanto de socialistoj en Belgujo, raportis detale pri alkoholo kaj demando laborista. Alkoholismo ne estas sola kaŭzo de mizero; per abstinenco oni ne solvos socialan problemon. Sed mizero ankaŭ ne estas sola patrino de alkoholismo kaj alkoholismo ankoraŭ ne malaperos, se estos forigita kapitalismo. Konsumado de alkoholo kiel nutraĵo estas egala al nulo, netrinkado estas do ekonomia kaj higiena profito. Disvastigita alkoholismo estas akompananto de kapitalismo; tiu ĉi produktas, vendas kaj disvastigas alkoholon. Laboristoj suferas de alkoholo, ili do devas forĵeti ĝin, por ke ili plibonigu sian ekzistadon. — Dua referinto KISS el Budapest: Kulturaj penadoj de laboristoj ne konas pli grandan malamikon ol estas alkoholo. Alkoholo estas helpilo, kiun uzas ŝtato kaj kapitalismo kontraŭ emancipo de laboristaro. Parolinto alvokis al social-demokrataro, ke ĝi batalu kun sia plej granda malamiko kaj ke ĝi tiel senigu homaron de tiu ĉi malbono. — Posttagmeze S-rino D-rino DASZYNSKI el Krakovio raportis pri industria uzado de alkoholo kiel rimedo kontraŭ alkoholismo; ĝis nun fabrikantoj ktp. subtenis personan konsumon de alkoholo pro profito, sed nun alkoholo komencas esti uzata kiel fonto de lumo, varmo kaj forto kaj ĝi estas uzata en industrio kemia. Tiel estas trovata nova kampo por konsumo de alkoholo, produktantoj ĝiaj komencas rilati ne malamike al abstinenco kaj ĉiuj antialkoholuloj devas subteni *industrialan* konsumon de alkoholo. P-ro KLEMP el Budapest proponas malkariĝon de alkoholo por bezonoj de tekniko, sed plikariĝon por trinkado. Teknikistoj, vi eltrovu malkaran rimedon denaturan, kiel ankaŭ ne multekostan lampon sen meĉo por lumigado per alkoholo.

Poste estis akceptita propono pri fondo de komisio por studado de ĉi tiuj demandoj kaj kiu samtempe propagandados ĉi tiujn ideojn.

Kiam estis finita debato pri organizado de batalo kontraŭ alkohola kaj kiam Stockholmo estis elektita por venonta kongreso, komencis oficiala dankado kaj fine disiro. — Vespere estis ankoraŭ kunvenoj de studentoj kaj laboristoj; en unua paroladis D-ro HOLITSCHER pri abstinenco kiel postulo de morala leĝo kaj ENDERSTEDT el Stokholmo pri abstinenco de sveda studentaro. En kunveno de laboristoj penis en senco de suprediritaj paroladoj pri laborista demando kaj alkoholismo bone konataj batalantoj de abstinenco P-ro FOREL el Zuriho, D-ro FROHLICH el Vieno kaj P-ro GUMFLOWICZ el Graz. Ankaŭ estis konstatita, ke plej fervora propagandanto de abstinenco inter laboristoj en Moravio estas soc.-demokrata deputito JOSEF HYBEŠ el Brno.

Laŭ bohema gazeto « Cas » tradukis

TH. ČEJKA.

Terkultura Kalendaro

JANUARO

Skribante pri la kampaj laboraĵoj kaj la teraj produktaĵoj, ni ne intencas utili nur al terkulturistoj, ĝardenistoj aŭ floristoj, kiuj kredeble estas informitaj pri la jenaj konoj, kvankam ili volonte rememorigos pri ili, sed antaŭ ĉio ni deziras plezurigi al ĉiuj amantoj kaj amantinoj de la bela kaj bona naturpatrino. La sekvontaj sciigoj estas eltiritaj el diversaj sed plej bonaj specialaj verkoj pri terkulturo.

La kamparo. — Mallongaj estas la tagoj en tiu monato ; tial eksteraj laboraĵoj fariĝas malfacilaj kaj ofte neeblaj. Malvarma aŭ malbela vetero devigas la kulturistojn restadi hejme dum multaj horoj, sed tiu tempo ne devas esti senutiligata, ĉar la precipaj okupadoj okazas en la domo.

Oni devas unue prizorgi la *nutraĵon de la bestoj*, kio estas tre grava afero. Tre zorgu porciumi la jungajn bestojn, tial ke ili vintre malpli laciĝas ; forigu de ili ian kvanton da hordeo aŭ aveno, kiun vi anstataŭos per radikoj, precipe karotoj, kaj nome per la blanka karoto je verda kolo, kiu tre konvenas al la ĉevaloj ; tiuj ĉi cetero ĝin tre ŝatas.

Oni devas haki kiel eble plej bone la sekalajn aŭ grenajn pajlojn, antaŭ ol ilin doni al plugbovoj, kaj oni zorgas ilin miksi kun la tranĉitaj radikoj. Bonegaj iloj estas hodiaŭ por tion fari : pajlhakiloj, pistiloj, cilindraj laviloj, radik-tranĉiloj.

Tiu monato estas ordinare uzata por la *grasigo de la bovoj*. Sed ni antaŭdiras antaŭ ĉio (kaj ni rekomendas) ke vi tre atentu, ilin aĉetante, tial ke de la bona aŭ malbona elekto de tiuj bestoj dependas la gajno aŭ perdo, okaozntaj al la grasigisto. Oni kutimas, ĝis la mezo de l'grasigo, pligrandigi iom post iom la porciojn ; la duono aŭ tri kvaronoj de la nutraĵo estas seka, tio estas fojno aŭ pajlo ; la cetero estas rapoj, brasikoj, karotoj, kaj aliaj radikoj.

Dum tiu sezono oni gardas ankaŭ la *bovinojn* en la stalo. Kutime la porcio de la bovinoj konsistas el radikoj, herbeja postfojno, avena pajlo, trifolio aŭ luzerno. Por ĉiuspecaj rasoj, kvin po cent (5 %) de ilia vivanta pezo per fojno, aŭ samvaloraĵo, sufiĉas por ilin konservi sanaj kaj donantaj multe da lakto.

La *bovidoj* ofte naskiĝas en tiu jartempo ; necesas do, ke oni zorgu tiam pri la bovidoj ; sed oni devas nur helpi al la naturo en la necesegaj okazoj. La zorgoj pri la bovidoj ne estas la samaj laŭ ilia difino, ĉu oni volas ilin konservi kaj elnutri, ĉu ilin sendi al buĉejo.

Oni zorgas pri la *ŝafinoj* antaŭ, dum, kaj post la nasko. Oni grasigas la *ŝafojn*, unue donante al ili 5 aŭ 6 po cent (5 à

6 %) de ilia pezo, en bona fojno aŭ samvaloraĵo. Ili povas konsumi ĝis po 3 kilogr. da radikoj, en du manĝoj ; pri la cetero, 1 kilogr. da bona fojno aŭ postfojno.

Ni devas atentigi ankaŭ al la porkejo kaj al la birdkorto. La *porkoj* bezonas sufiĉegan pajlaĵon, ofte renovigitan.

Al la *kortbirdoj* oni donas dum la vintro kui-itajn kaj varmajn radikojn, plidensigitajn per kelkaj plenmanoj da brano aŭ da branaĵo. Sed tre bone estos se oni kelkatempe nutras ilin per aveno kaj poligono, por ke ili pli frue demetu ovojn. Oni zorgos antaŭ ĉio pri la pureco de la birdkorto.

Tial ke oni tiam grasigas ĉiujn bestojn vendotajn dum la printempo, oni ĝenerale ne devas ŝpari la nutraĵon ; sed oni estas devigata garantii kontraŭ la malvarmo, la malpuraĵo, ĉiujn bestojn, tiel bone ĉevalojn aŭ ĉevalinojn, bovojn aŭ bovinojn, porkojn aŭ porkinojn, ŝafojn aŭ ŝafinojn, kuniklojn aŭ kuniklinojn, kiel kokojn kaj kokinojn, anserojn, meleagrojn, ktp. Konstante la staloj aŭ ĉevalejoj devas esti varmaj almenaŭ varmetaj, puraj, aerumitaj. Tre grava estas tiu demando pri la temperaturo.

La *kunikloj* estas nutrataj per sekaj furaĝoj, brano, lina kaj grena restaĵo.

La *abeloj* devas esti same ŝirmataj kontraŭ la malvarmo, la vento, kaj ankaŭ la tagmeza suno. Oni devas konservi, precipe en la malfortaj abelujoj, la nutraĵn rimedojn, alportante kiel eble nenian fluidaĵon, apenaŭ siropon, tegitan sur tolaĵo, pli ofte mielon, preskaŭ ĉiam sukeron kandon ; nature tre rekomendite estas neniam malordigi la abelujojn.

Intertempe, kaj tio ankaŭ estas tre grava, la kulturistoj utiligos sian devigitan libertempon dum la malbela sezono, plibonigante la plugilojn, kaj ĝenerale ĉiujn terkulturajn ilojn ; pretigante la palisojn por la vinberujo, la borante pri la kanabo kaj la lino, peklante la porkan viandon.

Oni draŝas la grenojn en la garbejoj, distilas ĉiuspecajn fruktojn ; oni ne forgesas faskigi la furaĝojn amase konservitajn.

Oni daŭrigas konduki sterkojn sur la plugotajn kampojn ; oni plugas la malpezajn terojn, kiujn oni intencas ensemi dum la printempo ; oni ekfaras aŭ rebonigas la fosaĵojn servontajn por la defluado de l'akvoj ; oni zorgas ĉikraŭtranĉi la plektobarilojn, ripari la murojn, elŝiri la junkojn kaj dornarbetaĵojn, formeti la ŝtonojn el trifoliejoj kaj aliaj furaĝejoj.

Ni ankoraŭ aldonu la jenon : oni devas eviti, ke la sterkaĵoj ricevu la defluaĵojn de l'tegmentoj, kiuj ilin lavas, solvante la salojn, enhavitajn en ili.

La vinberujon oni ektranĉas kaj purigas, tondante tamen nur dum bela vetero ; la ŝtipojn oni lavas per kalkakvaĵo ; oni sterkas ilin poste. Multaj kaj diversaj rimedoj, laŭ la landoj, estas uzataj kontraŭ la filoksero.

— P. CHAMPION

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

MOVADO ESPERANTISTA

Brita

Glasgow. — Fondiĝis societo celanta uzi Esperanton por komercaj bezonoj kaj disvastigi ĝin inter komercistoj. La unua entrepreno de tiu societo estas disvendado de tabakaĵoj kun fabrika marko « Esperanto ». — *Ol. Wd.*

London. — *The Daily News*, kiel ni jam diris, ĉiutage enpresas novaĵojn en Esperanto. La *Brita Esperantista Societo*, kiu certigis la proviazadon de la ĵurnalo per Esperantaj tekstoj insiste petas ĉiujn samideanojn, ke ili helpu al ĝi per sendado de veraj « novaĵoj » en Esperanto. La propagando ricevas grandan antaŭen-puŝon el tio. Turnu vin al *The British Esperanto Association*, 13, Arundel st., Strand, London.

— La grava prosiniorina gazeto *The Queen*, enpresas regule propagandajn artikolojn kaj plenan kurson de Esperanto; la aŭtoro estas nia kunlaboranto S-ro P. D. HUGON. Okaze de tio ĉi, ni rimarkas, kiom facile la gazetoj presas la ĉapellite-rojn. — En *The Malta Herald* (6 decembro), ni legas bonan nesubskribitan artikolon propagandan. — *OL. Wd.*

Hispana

El Esperantista Español (*La Hispana Esperantista*) estas la titolo de fako speciale dediĉita al propagando de Esperanto en la semajna revuo *Murcia*. La redaktoro de tiu parto (hispane redaktata) estas S-ro M. BENAVENTE. Li klarigas en la unua numero de tiu « fako », ke li intencas enpresi propagandajn artikolojn kaj precipe sciigojn pri grupoj hispanaj, adresojn de korespondantojn, ktp. tiamaniere, ke la fako estu kvazaŭ centra informejo por Hispanaj esperantistoj. Sian kunlaboradon promesis S-roj MACLEAN, LOPEZ, VILLANUEVA, SUDRIA, CODORNIU, kiu verkis artikolon en la unua n-ro, k. a. — Bonan sukceson al la entrepreno de nia kolego.

La Coruña. — Grava grupo fondiĝis dank' al klopodado de S-ro M. MONTEAGUDO, malnova esperantisto. La grupo jam konsistas pli ol sesdek membrojn. — Kurso estas komencita en laborista klubo.

Enguera (Valencia). — Grupo fondiĝis post laborado de S-ro F. SOLER VALLS, telegrafestro. La urbestro aligis sian urbestron al la lingvo kaj sendis oficialan gratulan leteron al D-ro Zamenhof.

Grupoj esperantistaj fondiĝis en *Bilbao* (S-ro RUFINO UNZAGA) kaj en *Barco de Valdeorras*, [Orense] (S-ro V. AMEIJERAS).

Kurson ĉiutagan faras S-ro CODORNIU en la Murcia Kazino ; ĝin aŭskultas diligente multaj kleruloj diversprofesiaj. — En la gazeto *La Verdad* daŭre aperas propagandaj kronikoj pri nia movado ; ilin redaktas lerte nia nelacebla samideano. — En *Burgos*, S-ro ESTEBAN esperas prosperi baldaŭan komencon de kurso ĉe la komerca ĉambro.

La gazetaro pli kaj pli parolas pri nia afero. Ni devas citi precipe *El Electricista* (S-ro SOLER), *La Correspondencia de España* (S-ro MONTEAGUDO), *La Correspondencia de Valencia* (S-ro SUMBIELA), *El Castellano* (S-ro ESTEBAN), *El Monticiero Bilbaino*, *El Nervión* (S-ro UNZAGA), *La Voz de Galicia*, *El Noroeste*, *Coruña Moderna*, *Revista Médico Social* (S-ro MONTEAGUDO), *El Bien Publico* (S-ro JUANEDA). Laŭ *Suno Hispana* kaj *El Esperantiste Español*. — OL. WD.

Franca

Parizo. — Grava propono laŭ iniciato de S-ro VADAL estas farita de S-ro HÉNAFFE, urbestro, al la pariza urbestro : li petis, ke la urbestro ordonu enkondukon de Esperanto en la urbajn superajn lernejojn. La peto estas sendita por ekzameno al komisio. Ni scias ke ĝi estas favore rigardata de multaj membroj de la urbestro. — S-ro CART komencis serion da paroladoj al la ŝtataj instruistoj en Parizo, kun permeso de la aŭtoritatoj. Ni ne bezonas diri, ke lia sukceso estas grandega. — Fondiĝis Pariza Grupo de la membroj de « Pacifisto », internacia societo esperantista por la Paco. — La « Presa Societo » ĉiam ricevas vizitojn de multaj fremdaj kaj provincaj esperantistoj vizitantaj Parizon, kaj kiuj estas certaj, ke ili trovos tie dum la tuta tago ĉiuspecajn informojn, ĉiajn esperantajn librojn, ne kalkulante la eblecon paroli kun diverslandaj esperantistoj. La laste ricevitaj vizitoj estis : S-ro KÜCHLER, el Frankfurto, kaj S-ro SABADELL, el Barcelono.

Reims. — Fondiĝis klubo Esperantista, kies honora prezidanto estas D-ro POZZI, urbestro, kaj efektiva prezidanto, S-ro MOROT, 2, rue Ponsardin. La klubo intencas kiel eble plej ofte rilati kun aliaj esperantistaj societoj, dissendi adresarojn de korespondemuloj, ktp.

Nancy. — La 9-an de decembro, en scienca amfiteatro de la Universitato, okazis unua leciono de la nova kurso de D-ro NOËL, la ĉie konata esperantisto.

Pli ol cent kvindek gelernantoj ĉeestis : ne nur profesoroj kaj kleruloj ĉiuspecaj, sed multnombre ankaŭ ĉiulandanaĝ gestudentoj, kies religia atento mirigis kaj ĝojigis nin !

Tial ke fariĝas jam en Nancy, nekalkulante la privatajn du ĉiusemajnaj publikaj aliaj kursoj : unua, elementa ĉe la *Cercle du Travail*, de S-ro inĝeniero BONZON, kaj la dua, supera, de S-ro profesoro THIAUCOURT ĉe la Literatura Fakultato, tia mirinda sukceso de tria kurso pruvas, ke la senĉesa klopodado farita de la ĉi tieaj pioniroj, kies S-ro profesoro MARESQUELLE kaj kolonelo MORETTI estis apostoloj, fine disĵetis ĉiujn barilojn.

Rimarkinde estas, ke tie ĉi ne nur francaj studentoj sed multegaj alilanduloj, precipe germanaj kaj slavaj alestas niajn Literaturan kaj Sciencan Fakultatojn. Per ili, nepre ankaŭ disvastiĝos tra la mondo la semo Esperantista. — G. FRÉCOT

Saumur. — S-roj MUFFANG kaj PRÉAUBERT, profesoroj en la liceo de Angers, faris grandsukcesan paroladon antaŭ 600 personoj. Poste, Fr-ino A. ROUX, nia malnova samideanino, komencis kurson en la urbestrejo : 200 personoj aŭskultas ĝin diligente. — S-ro RABINEAU, apotekisto en Saumur, komencis serion da paroladoj en la urboj de la tuta departemento.

M.

Orléans. — Du kursoj estas farataj en la urbestrejo de S-rino grafino A. VILLARET kaj de S-ro PAPELIER, profesoro en la liceo ; ĉirkaŭ 100 lernantoj diligente aŭskultas ĉiun el ili ; la progresoj estas mirindaj. — M.

Rouen. — En ĝia lasta kunsido, kaj laŭ la propono de S-ro CH. VERGNE, ĝenerala sekretario de la *Federacio de la Oficistoj de Francujo* kaj membro de la grupo esperantista, la konsilaro decidis prezentigi antaŭ la kongreso internacia de oficistoj, okazonta en Londono dum Paskaj Festoj 1906, raporton konkludanta akcepton de la lingvo Esperanto kiel oficiala lingvo de la oficistaj societoj.

Tial ke la oficiala uzado de nia lingvo dum la kongreso, kaj ĉar la akcepto de Esperanto kiel komuna komprenilo inter la potencaj societoj de oficistoj, kredeble kaŭzos la aliĝon de la tuta oficistaro al nia afero, tial, ni insiste petas ĉiujn samideanojn ke ili helpu kiel eble plej multe la aferon.

Inter la priparolitaj temoj estas : la ĉiusemajna ripozo, la nombro de laboraj horoj, la problemo de labormanko, pensioj por maljunuloj, ktp., kaj la jenaj societoj jam sciigis ke ili sendos oficialajn delegatojn : *Ligue Nationale des Employés et Voyageurs* (VottemLiège), *Federacion nacional de Dependientes* (Barcelona), *International Retail Clerks Protective Association* (Denver, Colorado U. S. A.), *Fédération nationale des Syndicats d'Employés* (Paris), *Fédération des Employés de France* (Rouen), *National amalgamated Union of Shop Assistants, Warehousemen and Clerks* (London), ktp.

S-roj VERGNE, 35, rue Stanislaus Girardin, Rouen, kaj GEHET, 10, rue de l'Ouest, Rouen, petas ĉiun esperantistan grupon ke ili bonvolu sciigi pri la kongresontaj societoj aŭ sindikatoj de sia urbo kaj disdoni al ili propagandilojn.

Ili danke respondas al ĉiu samideano tion farinta kiu ĝentile sciigos ilin pri sia agado, eĉ se nesukcesinta.

Ili provos mem esperantistigi la kongresontojn (kiaj ajn estus iliaj opinioj pri korporaciaj temoj) por ke ĉiuj aprobu la raporton por Esperanto kaj se eble uzu nian lingvon dum la kongreso.

— A. G.

La gazetaro. — En *Etoile Polaire* daŭrigo de la bonega kurso de S-ro KOCH. — En la grava revuo *Annales politiques et littéraires* ĵus finiĝis la detala kaj lerta kurso de S-ro CAPÉ-MONTROSIER. — En *Lyon Republicain* aperis bona raporto pri la parolo de S-ro BRACHET, kronikita en nia lasta numero. — En *Tribune de la Somme* aperis atako de la redaktoro kontraŭ Esperanto kaj bonega rabato de S-ro QUESTE. — En la *Dépêche Dauphinoise* enpresigis bona propaganda artikolo de S-ro SONNIER, alvokanta la komercistojn al uzo de Esperanto, enskribiĝo en adresarojn, ktp. — En *La Presse Médicale* estis favore raportata pri la apero de *Revue Medicina*.

Belga

Kursoj novaj estas farataj en *Huy* kaj *Liège* de S-ro L. BLANJEAN. Nia nelacebla propagandisto devas vojaĝi 200 kilometrojn por fari la unuan ! La dua estis aŭskultata de tiom granda multo da homoj, ke oni devis tuj disduigi ĝin ; la duan sekcion profesoras S-ro ROYER. — En Bruselo, Fr-ino LÉCOINTE faras privatan kurson al rondeto da gesinjoroj. — En la grava gazeto *Journal des Instituteurs Belges* (Gazeto de la Belgaj Instruistoj), S-ro MATHYS filo komencis plenan kurson de Esperanto. — En *Verviers*, estas farataj du kursoj, de S-ro PALMER.

En Antverpo estas daŭrigata propagando energia : komercistoj disvendadas ĉampanon, tabakon, pipojn, paperon « Esperanto ». (Laŭ *Belga Sonorilo*, k .a.) — M.

Hungara

La gazetaro. — La ĉiusemajna, fama pedagogia gazeto *Nemzeti Iskola* (Nacia Lernejo) jam komencis serioze skribi pri Esperanto. En sia 47-a numero de S-ro Z. BARANYAI aperis artikolo pri Esperanto ĝenerale kaj speciale pri la ideo de S-ro H. ALFERI rilatanta la internacian pedagogian informojn kaj bibliotekon. En la 49-a numero de sama gazeto aperis pli longa artikolo de S-ro G. MARICH pri « La eduka forteco de Esperanto ». Li parolas tre simpatie pri Esperanto kaj montras la grandegan logikan fortecon de Esperanto, kiu mem povas ludi tre bonegan rolon en la eduko.

— La revuo *Bélyegüjság* (Filatelista Gazeto) daŭras la seriozajn artikolojn pri Esperanto. En la novembra numero aperis la tria artikolo de S-ro A. MARICH, kaj en tio ĉi li parolas pri la historio de internacia lingvo.

Stenografistaro. En la Stenografiista Rondo de l' ŝtatgimnazio en *Szeged*, je la ĉeesto de la tuta membraro, Sro Z. BARANYAI, faris paroladon pri Esperanto ĝenerale kaj speciale pri la Esperanta Stenografio, kaj li montris al la membroj kelkajn stenografiajn lernolibrojn; li aparte sciigas la sistemon de S-ro pastro SCHNEEBERGER laŭ la *Stolze-Schrey*'a sistemo. La Rondo intencas fari grandajn movadojn por Esperanto inter la hungara stenografistaro.

Nova hungara lernolibreto (krestomatio) aperis de S-ro Eŭg. LÁNG, titolite *Beszéli már az Esperantót?* (ĉu vi parolas jam Esperante?) en eldono de firmo SACHS (prezo 30 hungaraj heleroj). La libreto komencas per enkonduko, tion ĉi sekvas la gramatiko. Ve, la presejo, ne havante Esperantajn literojn, uzis slavajn!

Sed sur la deka paĝo li uzas la formojn *shi, ghi, ktp.* Tio ĉi estas senkonsekvenco, kiu malhelpas la lernadon. Ankaŭ en la ekzercoj troviĝas kelkaj eraretoj. La vorto *homino* (pĝ. 14) estas tute erara, bedaŭrinde ankaŭ kelkaj aliaj preseraroj troviĝas en la libreto, kio estas tre bona propagandilo, sed ni tamen tre atendas la aperon de iu granda kaj metoda lernolibro hungara, kiun nun pretigis nia lerta, eminenta samideano S-ro profesoro A. ALTENBURGER, kiu atendas nur la preson. S-ro A. ALTENBURGER ankoraŭ pretigis bonegan propagandan hungaran libreton, kaj ellaboras grandan hungaran-Esperantan vortaregon.

Z. BARANYAI

Germana

Stenografistaro. — La plej granda kaj fama germana stenografia revuo ĉiumonata: *Archiv für Stenographie* (Arhivo por stenografio, eliranta en Breslau, sub redaktado de nia samideano KURT DEWICHEIT) en sia 10-a numero en longa artikolo konigis la esperantan stenografion, la novan sistemon de S-ro SCHNEEBERGER, kaj tre longe paroladas ankaŭ pri Esperanto ktp. Ni do sciigas, ke la sekvantaj stenografiaj sistemoj ekzistas en Esperanto: J. Brauns (Ahlberg, 1899); Scheithauer (Bulthuis); Groote (Cogen); Faulmann (Reichenbergaj stenografiistoj); Faulmann (Grubinger); De Vries (De Vries, 1903); Gabelsberger-Scheithauer (P. P. Wolk); Stolze-Schrey (V. V. Bitnero); Duployé (Iu el Limoges); Stolze-Schrey (Schneeberger, 1905); Pitman (A. W. Lyndride, 1905); Duployé (M. David); Prévost-Delaunay (M. David); Marti; Gabelsberger (L. Jakab).

— Z. BARANYAI

Halle (Saale). — Nova (ne tre granda, sed fervora) grupo fondiĝis en tiu urbo. Prez.: W. FRITZ, inĝeniero. Ĉar Halle estas konata pro ĝiaj lernejoj (universitato, ktp.) kaj bibliotekoj, la grupo baldaŭ bezonas bibliotekon, precipe por povi sufiĉi la multajn pruntedandojn de la varbiĝemoj. Oni petas ke la

amikoj bonvolu sendi al la adreso de ĝia sekretario — Esperantisto n-ro 9819 — disdoneblajn verkojn, jarkolektojn de niaj revuoj, k. c.

Frankfurt a/M. — La esperantista grupo daŭrigas ĉiam energie propagandadi. Folio propaganda estas dissendita al multaj gravaj personoj ; en ĝi estas entenata poŝtkarto, kiun oni bezonas nur sendi laŭ la surprisita adreso por reen ricevi lernolibrojn, ktp. Alia propaganda folio, regule dissendata ĉi-monate, estas aparta eldonaĵo de la germanlingva kroniko de nia kolego *Germana Esperantisto*.

Gazetaro Esperantista

Algeria Stelo, decembro, 1905. — A. BAISSAC daŭrigas araban legendon « Diab kaj la bela Dĵizia ». — Grafo GALLOIS skribas notojn pri sia esperantista vojaĝo Afrikon. — Kroniko, Bibliografio, ktp. — L. M. B.

Antaŭen Esperantistoj, septembro 1905. — Programo de la Kongreso en Boulogne. — Projekto de D-ro ZAMENHOF pri tutmonda ligo (el L. I.). — Bibliografio. — Kroniko.

Oktobro 1905. — Parolado de D-ro ZAMENHOF en la Kongreso (el L. I.). — Kroniko. — Ol. Wd.

La Belga Sonorilo, okt. 1905. — LUCIEN BLANJEAN montras, ke la kongresoj « internaciaj » estos vere internaciaj nur post alpreno de internacia lingvo. — SENHAVULO sprite babilis pri la lasta internacia kongreso de kirurgio. — LEO BELMONT enpresigas belan tradukon de ĉarma pola versaĵo el ADAM ASNYK. — VIEILHOMME raportas france pri la lastaj klopodadoj de la ankoraŭ nun ekzistantaj volapükistoj. Diversaj germanaj gazetoj ŝajnas ankoraŭ kredi, ke Volapük vivoplene kreskas ; ekzemple la *Strassfurter Zeitung* skribas la 25-an de novembro 1904 : « Volapüko elportis la provadon per fajro kaj al militis al si la mondon ! » — AMATUS kaj INTERIM skribas flandre propagandan artikolon kaj raporton pri festo organizita de la Ant-verpa grupo. — Diversaĵoj, Kroniko, Bibliografio, Sciigoj el la Belga Ligo; ktp.

Novembro 1905. — Deklaracio pri Esperantismo. — D-ro SEYNAEVE komencas interesoplenan artikolon pri la demando, ĉu estas bone altrudi al Esperantistaro direktantan organizaĵon, ktp. Dum la kongreso, oni decidis... ke nur posta kongreso decidus kaj oni komisiis la estraron de la I-a Kongreso por ekzameni la proponojn kaj fari raporton al la II-a Kongreso. La diskutado pri la dirita demando estis konfuzega ; la granda plejmulto de la ĉeestantoj brue protestis kontraŭ pro-

pono farita de iu, ke oni komisiu kelkajn Parizajn Esperantistojn, kiel provizoran organizon komitaton ; oni akceptis unanime la proponon de S-ro CART, ke « estas dezirinde, ke la naciaj esperantistaj societoj plimulte interrilatu inter si ». Poste, oni komisiis la estraron de la I-a Kongreso por fiksi la lokon por la II-a Kongreso. Tiu estraro, esence komisiita nur por ekzameni la projektojn pri Centra Komitato kaj por decidi pri la II-a Kongreso, alprenis poste la nomon « Provizora Organiza Komitato » kaj starigis en Parizo « Esperantistan Centran Oficejon ». Tiu komitato, laŭ la aŭtoro, iom trograndigas sian « provizoran » kaj esence nedaŭran rolon ; oni ne konsideru, kiel definitivan realaĵon, kio estas nur provizora provo. Tiu komitato, konsistanta krom D-ro Zamenhof el 5 membroj, posedas 4 sekretariojn, kiuj, fondante la oficejon, aldonis al si 5-an sekretarion ; ĉiu membro do havas sian sekretarion. Daŭrigo estas anoncita. — MALINO mokas la higienistojn, kiuj volas malpermesi manĝadon, trinkadon, spiradon, ktp. pro la preteksto, ke mikroboj diversaj troviĝas en la nutraĵo, en akvo, en aero, en teatro, ke alkoholo venenigas, ktp. — VIEILHOMME sprite priskribas france novan malsanon, « esperantofobion » ; tiaj artikoloj perdus sian tutan ĉarmon je analiziĝo : oni devas ilin legi en la teksto mem ; tial estas konsilinde legi *in-extenso* la artikolon, kiu sciigas nin, ke renkontiĝas resaniĝaj okazoj : « S-ro Albin Rozet, ekzemple... » — Flandra propaganda artikolo de AMATUS pri « Esperanto en lernejoj ». — Bela versaĵo el THÉOPHILE GAUTIER tradukita de S-ro PHILIPPET. — Diversaĵoj, Kroniko, Bibliografio, ktp. — P. B.

The British Esperantist, decembro 1905. — Artikolo de la redakcio, « Al niaj legantoj » pri niaj progresoj kaj la neceseco subteni niajn propagandistojn kaj propagandilojn. — Sciigo pri la unuiĝo de « The Esperantist » kaj « The British Esperantist ». — Kelklinia opinio de D-ro Zamenhof pri la disputado fariĝanta pri « imperativo » : « la disputado pri la *nomoj* subjunktivo kaj imperativo ŝajnas al mi tute superflua ; tamen mi trovas ĝin ankaŭ sendanĝera ». — Versaĵo tradukita de CL. BICKNELL el angla poemo de R. HERRICK. — Gramatikaj klarigoj de A. E. W. (8013) pri esperantaj vortoj « donaci, oferi, aboni, kotizi » kaj traduko de diversaj anglaj parolturnoj. — Fine C. OXFORD angle petas, ke la Esperantistoj afable rilatu kun la malamikoj de Esperanto. — THOMAS HOSKISON tradukas artikolon de F. FRASER pri la Francaj Kanadanoj, kiuj konservis sian francan karakteron meze de Angloj kaj Amerikanoj. — ESP. (7778) babilas kelkajn vortojn pri la modo kaj la sekvoj de la diversformeco de la vestoj. — Bibliografio, Kroniko, ktp. — Ol. Wd.

Der deutsche Esperantist, decembro 1905. — J. B. proponas ĝeneralan organizon de la propagando en Germanujo. Sian parton de iniciativo kaj intereso en la esperanta propagando devas havi ĉiuj grupoj, almenaŭ gravaj. Tio estas

farebla se la grupoj dividos inter si la diversajn fakojn de la propagando : ekzemple, se grupo en urbo A sin okupas precipe pri propagando ĉe la gazetaro en tuta Germanujo, grupo en urbo B pri negocistoj, ktp. Nature ĉiu grupo restos libera agadi laŭplaĉe en sia urbo, sed ĉiu havus unu specialan sperton kaj konon pri difinita fako. — F. SCHUCK montras kelkajn specimenojn el lia preparata albumo de eminentaj esperantistoj ; estas montrataj portretoj de D-ro ZAMENHOF, EINSTEIN, TROMPETER, L. E. MEIER, A. MICHAUX. — BRENDGER, inĝeniero en Malmesbury (Sudafriko), petas helpon por siaj kunlandanoj ruinigitaj de ciklono. — W. K. esperantigis kelkajn pacifistajn liniojn de A. FOREL. — K. F. AHLGRIMM sprite rakontas la aventuron de Sinjoro Brown, kiu « malsatis du tagojn sennecese ». — F. SKEEL GIÖRLING tradukas rakonteton de ANDERSSSEN, « La knabineto kun alumetoj ». — Kroniko, ktp. — O. L.

L'Espérantiste, novembro 1905. — L. DE BEAUFONT rememorigas, ke estas grava por la propagando, komenci la agadon en urbo, varbante unue neŭtrajn privatulojn aŭ societojn. Se oni komencas, fondante grupon socialistan aŭ religian, vole-nevole la lokanoj opinias, ke Esperanto favoras precipe la partion, kiu fondis la grupon kaj plej ageme okupas sin per la propagando. Kontraŭe, se oni unue fondis senpartian grupon, poste estas tre facile starigi la partiajn propagandajn organizaĵojn. — Letero de D-ro ZAMENHOF al S-ro SCHNEEBERGER pri la kunveno de la II-a Kongreso en Genevo. — Cirkuleroj de la Centra Oficejo. — Kroniko, Bibliografio, Societaj informoj, kandidatoj, ktp. — M.

Esperanto Hungara, decembro 1905. — L. GIAMBENE, el Romo, skribas kelkajn notojn pri sia vojaĝo Hungarujon. — Z. BARANYAI tradukas epizodon el verko de M. JÓKAY. — LUPULO priskribas mallonge urbon Kőszeg. — M. NIEGER tradukas anekdoton el la franca verkisto CHAMFORT. — F. PUJULA skribas artikolon por sendependeco de Katalunjo. — E. VALLES rakontas aventuron el lia propaganda vivado. — Kroniko, ktp. — P. L.

Esperanto Franca, 5 decembro. — En la franca parto, CH. LAMBERT finas serion da artikoloj pri la rilatoj inter Esperanto kaj la naciaj lingvoj. Li montras, ke la diverseco de lingvoj estas malhelpaĵo por la progresiĝado de la homaro kaj la amikiĝado de la popoloj ; aliparte ilia multeco nebligas la bonan instruadon. — IU raportas anekdoton rakontitan de S-ro CART en parolado. Dum sia vivado en Svedujo, S-ro CART fondis en Upsalo grupon de l'« Alliance Française » por la lernado de la franca lingvo ; tiu ĉi grupo konsistis 80 membrojn. La sekvantajn jarojn fondiĝis grupoj angla kaj germana, kiuj konsistis 120 membrojn ĉiujn membrojn de la franca grupo kaj plie aliajn personojn. Tio ĉi okazas preskaŭ ĉiam, en plej diversaj landoj, ĉar ofte oni ne elektas lingvon por ĝi mem, sed

por diversaj flankaj kaŭzoj. La sama aŭtoro diras « Kion deziras anglo lernanta la francan lingvon? Li esperas, ke li povos enkonduki en Francujon anglajn produktaĵojn, ideojn, ktp. Francujo do nenion gajnas je tio; kaj reciproke; sekve, Esperanto nenion malutilas la diversajn landojn, malhelpante la disvastigon de la naciaj lingvoj. — En la Esperanta parto, estas represata el L. I. la artikolo de SAMIDEANO pri la neceseco de du novaj prepozocioj. Noto de la REDAKTORO diras: « ni evitu la troan komplikigon de la lingvo ». — AJNO kritikis la projekton de S-ro CHAPPELIER, konsistantan trudi en Francujo la lernadon de angla lingvo kaj en Anglujo la lernadon de franca lingvo. — S-ro SENTIS opinias, ke oni povas uzi kelkajn verbojn. (ekz. : balanci, komenci, fleksi, klini, movi, ŝanceli, paŝti, turni, ruli) indiferekte aktive aŭ neŭtrale. — Bibliografio, kroniko, ekzercoj, ktp. — Ol. Wd.

Espero Katolika, — oktobro 1905. — E. PELTIER difinas la programon por la tria jaro de la gazeto. Li finas dirante: « Kelkaj el miaj korespondantoj plendas, ke ili ne ricevas sufiĉe rapidan respondon, eĉ nenian, kiam ili skribas al mi. Ili senkulpiĝu min kaj konsideru, ke homo, kiu dediĉas sian tempon ekster siaj profesiaj devoj al l'afero Esperanta estas devigata ŝpari avare sian tempon kaj ... monon. S-ro DE BEAUFONT en *L'Espérantiste*, S-ro MOCH en *Espero Pacifista*, kaj kredeble aliaj, petis la saman senkulpiĝon. Sendu konsilojn, opiniojn, artikolojn, versaĵojn: mi ĉiam uzos ilin laŭeble: sed, mi petas, ne postulu respondon. Kiam estos nepre necesa, mi certe respondos ». L. E. MEIER enpresigas versaĵan tradukon el DROSTE-HÜLSHOFF. — P-ro DOMBROVSKI skribas kelkajn vortojn pri katolika paca literaturo. La kristanoj devus esence okupadi sin pri la paca movado. — E. J. WEEMAES kolektis aforismojn. — Kroniko, ŝakaj lecionoj, ktp. — L. M. B.

Espero Pacifista, septembro 1905. — P-ro RICHEL rebatas argumentojn de tiuj, kiuj pretendas, ke la Rusa-Japana milito estis bonfaro por Japanoj, ĉar sen ĝi la agado de Rusoj devigus la Japanojn mortiĝi pro malsato en siaj troloĝataj insuloj. — G. MOCH skribas artikolon pri frazo de S-ro MONTROSIER en *Tra la Mondo* Kiu volas pacon, preparu militon. La aŭtoro montras ke tiu, kiu volas pacon, devas prepari... pacon. — Notoj pri la traktato de Portsmouth. — La Societo; aliĝoj, ktp. — Mortigitoj kaj vunditoj de la rusa-japana milito. — Kosto de la rusa-japana milito. — Venkintoj ruinigitaj de siaj propraj venkoj. — Armadoj ŝiparaj. — Studoj pri anstataŭo de armeoj per « milico ». — Konferenco en Portsmouth. — La franca-maroka konflikto kaj la Mahometa naciĉo. — Svedanorvega konflikto (kun la letero de FREDERIC PASSY). — Savorgnan de Brazza. — Haga Kortumo: nova membro. — Arbitracio pri Novlando. — Traktato inter Rusujo kaj Usono. — Arbitracio franca-venezuela. — Svisujo kaj arbitracio. — Movado pacifisma, Libro kaj Revuoj, Vortaro pacifisma, korespondado. — L. M. B.

Internacia Revuo Medicina, januaro 1906. — M. SOUPAULT : La stomakaj doloroj. — O. SARWAY : Frua aŭskultado de la batoj de la feta koro. — KISCH : Pri la periodeco de la malsanaj procesusoj dum la seksa vivado de la virino. — SICARD : Haŭta abdomena reflekso dum la tifoja febro kaj apendicito ĉe la infano. — G. ULMAN : La vibra palpebrumado kaj la renaj afektoj. — WIART kaj COUTELAS : La tuberkloza reŭmatismo ; tuberklozaj artralgioj. — CARAMANO : La histeria febro. — CARRIÈRE kaj LOTHE : Longedaŭraj paŭzoj de la tuberkloza meningito ĉe la infano. — H. C. GORDINIER : Nemortiga eksterenrompiĝo de aorta aneŭrismo. — P. SAINTON : Pri la serĉado de la Kernig'a signo. — POLLOCK : Kuracado de la sifiliso en kontinentaj landoj. — H. LUTHJE kaj R. ROMME : Kelkaj faktoj interesantaj pri la dieta kuracado de la diabeto. — J. VOISIN kaj R. VOISIN : La nutra dieto de la epilepsiuloj. — G. CARPENTER : La liber-aera kuracado de malsanoj ĉe infanoj. — FRÖHLICH : Kuracado de la femurrompoj ĉe la suĉinfano. — VEYRASSAT : Kuracado de la ulceroj per varma surakvado sala. — M. CARLIER : Pri la kuracado de la varikoj per la metodo de Trendelenbourg-Remy. — LUCAS-CHAMPIONNIÈRE : Pri la kuracado de l'elartiko. — G. PHILIPPET : Eŭropa kinino. — PHILIPPET : Magnezia peroksido en terapio. — A. BARILLÉ : Malbonaĵoj de la miksado de la laŭro-cerasa akvo kun la solvaĵoj por subhaŭtaj enŝprucoj. — CORRET : Karbonoksido kaj tabaka fumo. — L. M. B.

Tra la Mondo, novembro 1905. — Fr-ino C. OXENFORD rakontas la anglajn kristnaskajn kutimojn kaj la gravan rolon de la pudingo en tiu tempo. — P-ro BORD skribas pri la Lapoj, la plej nordaj loĝantoj en la mondo. — J. LUNDGREN priskribas la vintromezan sunfeston en skandinavaj landoj kaj ĝian pratempan devenon. — P. HEDSTRÖM priskribas svedajn kristnaskajn kutimojn. — A. MONTROSIER priskribas la finon de la Kongreso : la viziton al Calais, ktp. En kronika artikolo, la sama aŭtoro aldonas, ke ĉiu esperantisto subtenu sian nacian societeton kaj abonu sian nacian revuon esperantistan. La diversa jesperantaj gazetoj ne devas konkurenci unu la alian, sed devas preni por si ĉiu apartan fakon ; li mem ne enpresos versaĵojn. — Eltiraĵo el « Kristnaska Sonorado », el DICKENS, tradukita de D-ro MARTYN WESCOTT. — R. BLOTTIÈRE priskribas faradon de ludiloj por infanoj kaj paĉjoj. — A. BAISSAC enpresigas amuzantan monologon. — Diversaĵoj, Bibliografio, ktp. — Bildoj. Ol. Wd.



Pro manko da spaco, pri ceteraj gazetoj kaj nove elirintaj verkoj esperantistaj ni parolos en nia venonta numero.

DIVERSAĴOJ

Pri imperativo kaj subjunktivo.

Kial oni tiel akre disputas pri la vortoj *imperativo* kaj *subjunktivo* (aŭ *konjunktivo*), mi ne povas kompreni.

En Esperanto ekzistas nur unu modo : la *u*-modo aŭ *vola* modo, kiel tre prave nomis ĝin S-ro DESHAYS¹.

Tiun modon ni tradukas francen per nia imperativo en la rekta parolado (*oratio recta*) kaj per subjunktivo en la nereakta parolado (*oratio obliqua*) Ekz.

Estus tre bele : « iru al la fonto ! » (... *vas à la fontaine !*)

Estus tre bele, ke vi (mi) iru al la fonto !² (... *que tu ailles à la fontaine*).

Tion mi volas : « tien iru ! » (... *vas y !*)

Mi volas, ke vi tien iru³ (... *que vous y alliez*).

Do, kiam, en niaj naciaj lernolibroj, ni komparas la nacian lingvon kun Esperanto, tute rajte tiun *u*-modon ni nomas, laŭ la cirkonstancoj, ĉu imperativo, ĉu subjunktivo.

Ke oni ne ĉiam uzas esperante la *u*-modon, kiam ni uzas ĝin france, tio ne estas argumento kontraŭ la nomo subjunktivo⁴ germane ankaŭ kaj latine aŭ greke oni ne ĉiam tradukas per subjunktivo nian subjunktivon ! Tamen en tiuj lingvoj ni kutimas uzi la nomon subjunktivo, kaj ni estas pravaj.

Ke la formo (-u) estas unu kaj sama, tio, aliparte, nenion pruvas kontraŭ la uzado de du nomoj en gramatikoj naciaj. Ĉu vere iu kuraĝus diri, ke la artikolo *la* estas ununombra en *la* homoj, ĉar ĝi estas sama en *la* homo ?

*

Rimarkinde estas, ke ankaŭ en demando, oni esperante ne faras diferencon inter la rekta kaj la nereakta parolado :

Ĉu vi venos ?

Diru al mi, ĉu (*si, ob, whether*) vi venos.

*

Konkludo : Ni libere uzu ambaŭ vortojn, imperativo kaj subjunktivo, se ili plaĉas al ni ; aŭ, se ili malplaĉas, neniun el ambaŭ, sed nur la nomon : *u*- aŭ *vola* modo !

*

Kaj ni ne bataladu pri manieroj pli-malpli dubaj, sed nur por tutmonda propagando de Esperanto, tia kia ĝi estas ! La tasko sufiĉas ! Ĉu ne ?

TH. CART

1. *Lingvo Internacia*, 1905, p. 450, Malpli bona estas la nomo *ordona*, tial ke ĝi estas tia nur okaze, ne necese.

2. Zamenhof, Ekzercaro, § 19.

3. Ibid.

4. La vorton subjunktivo uzas Zamenhof, sed ŝajne, laŭ slava maniero, kiel sinonimo de *Conditionalis* (Ekz. § 19, Notetoj).

Rapido reaboni!

KARA LEGANTO, tiu ĉi numero estas **la lasta**, kiun vi ricevos, ĝis via reaboniĝo, se via abontempo jam finiĝis.

Se vi reabonis, sur la dekkvin-januara banderolo estos presata la dato, je kiu finiĝos via abono: tio estos konsiderata kiel kvitanco kaj atesto pri la ricevo de l'abono.

Koran dankon por via estinta kaj espereble estonta subtenado,
— L. I.

Avizo al multaj. — Ni ofte ricevas petojn, ke ni anoncu la estontan aperon de eldonaĵoj, gazetoj, ktp. Tio ĵus okazis ekzemple pri « tuj elironta » gazeto esperantista.

Ni devas sciigi niajn legantojn, ke nia severa regulo estas nun: *ne anonci en la gazeto tion, kio ne ankoraŭ aperis*: tro ofte bonintencaj samideanoj devas forlasi siajn entreprenojn, kio kaŭzas al ili, al niaj legantoj kaj al ni mem ĉiaspecajn malagrablecojn.

Nia konduto ne estu konsiderata, kiel malĝentila, sed kiel garantia por la seriozeco de L. I. kaj de la tuta esperanta afero.

Post la apero, ni volonte raportos; antaŭ ĝi, ne.

LA REDAKCIO.

En niaj plej proksimaj numeroj aperos: *Centra Afriko* de D-ro CUREAU, kolonia administratoro, — *Internacia vivo de Svislando*, *Pri la proverboj en Esperanto*, *Konsideroj pri la mondo*, *la ideo de Evolucio en skulptarto* (kun figuraĵoj), kaj multaj literaturaĵoj, miksaĵoj, opinioj, ktp. Plie la rubrikoj *Kroniko* kaj *El la Esperanta Gazetaro* estos regule daŭrigata.

L. I. nun ampleksos regule **32** paĝojn kaj la *Aldono*, **16** paĝojn, t. e. kune **96** paĝojn monate, pli ol **1150** paĝojn jare. La linioj estos pli ol 50 000, kaj la kvanto da uzitaj literoj atingos 3 000 000 jare!



Bindilo por la gazeto Lingvo Internacia

La granda sukceso de niaj specialaj bindiloj difinitaj por provizore bindi la kajerojn de la granda Vortaro *Franco-Esperanto* instigis nin fabrikigi similajn por bindi provizore la kajerojn de nia gazeto iam post iam laŭ ilia apero. Ni do povas rekomendi tiujn praktikajn bindilojn al ĉiuj niaj abonantoj; ili povos ankaŭ taŭgi por diversaj paperaĵoj el sama formato.

Prezo: 1 fr.; afranke: 1 fr. 40.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro: Th. Cart, prezidanto; Paul Fruictier, Ch. Vérax, deleg.;

Sekretario de l'administrantaro: V. Chaussegros.

Teknika direktoro: Lengyel Pál. — Sekretario de la gazeto: William Mann.

L'Imprimeur-gérant: P. Fruictier

